
# ?tata konsilantaro alvokas elekton de provincaj guberniestroj




Havano, apr 24 (RHK) Venontan  28-an de majo je la 9:00 a.m. la? loka tempo, okazos la elekto de provincaj guberniestroj kaj vicguberniestroj  en  Kubo, la? decidis  la ?tata Konsilantaro, surbaze de  la Konstitucio kaj la Balota Le?o.

Komuniko de la Nacia Asembleo de Popola Povo (Parlamento), publikigita en ?ia retejo, precizigas, ke provincaj guberniestroj kaj vicguberniestroj estas elektitaj de la delegitoj al la municipaj asembleoj de Popola Povo, la? propono de la Prezidento de la Respubliko, por periodo kvinjara.

La ceremonion de vo?donado gvidas la prezidanto de la koncerna Municipa Elekta Konsilantaro, kaj la deputito indikita de la ?tata Konsilantaro por tiu celo, finas la tekston.

La 19-an de aprilo en la Havana Kongresejo estis konstituita la X-a Le?donado de la Kuba Parlamento, formita de la 470 deputitoj elektitaj la 26-an de marto en la naciaj elektoj.

Kiel prezidanto de la parlamento kaj de la ?tata konsilio, Esteban Lazo, kaj Ana María Mari Machado kaj Homero Acosta Álvarez estis ratifitaj en la postenoj de vicprezidanto kaj sekretario, respektive, kiuj estras

siavice  la ?tatan konsilion.

Per plimulta vo?dono, Miguel Díaz-Canel estis reelektita Prezidento de la Respubliko; Salvador Valdés Mesa, en la posteno de Vicprezidento; kaj Manuel Marrero kiel ?efministro, la? propono de la ?tatestro.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/320559-stata-konsilantaro-alvokas-elekton-de-provincaj-guberniestroj

Radio Habana Cuba